

# NORMANDA ESPERANTO BULTENO



## ESPERANTO - NORMANDIE

**Redaktas** : Pierre Lemarchand, 2 résidence les Terres Quemines 76113 Hautot-sur-Seine.  
Tel. 02 35 34 28 78 LEMARCHANDPI@wanadoo.fr

**Abon-kotizoj** : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.  
La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la enhavo de la artikoloj kaj opinioj de la unuopaj aŭtoroj.



### 64a Ĝenerala Kunveno. Bricquebec

La normandaj esperantistoj ĉi-jare kunvenis en Bricquebec (Brikbek) en norda parto de la departemento Manche. Surloke, nia amiko Mark, pastro en la apuda abatejo, multe helpis por sukcesigi la aferon pro siaj bonaj rilatoj kun la urbodomo. Lia Abatejo akceptis nin por la tag- kaj vespermanĝoj.

Tre sukcesis la du publikaj prelegoj de **Hori Jasuo** kaj **Arai Toŝinobu** pri la japana skribarto (matene) kaj la katastrofo de Fukuŝimo (posttagmeze). Bricquebec, je kelkaj kilometroj de atomaj uzinoj, tre taŭgis por pritrakti tiun temon.

Ni ne forgesos la tre amikan akcepton de la urbestro kaj vicurbestrino de tiu vizitinda urbeto.

Venis trideko da esperantistoj de la kvin normandaj departementoj por paroli pri sia regiona, agado en tre bona etoso.

.../...



### En tiu numero :

Bricquebec.	2
Kaverno de Baligano.	3
L. Caron. - M. Grosjean.	4
Financ-raporto; Kursoj, Kongresoj, kunvenoj.	5
Musa anekdoto.	6

## Paĝo 2a

Nia asocio havas modestan rolon : ligi inter si la klubojn kaj kiel eble plej multe helpi ilin reklami pri esperanto. Kursoj ekzistas en Le Havre, Hérouville, Flers, Coutances, Cherbourg, la regiono de Granville. Du homoj respondecas kadre de naciaj asocioj, kiel kasisto de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) por franc-lingvanoj, kaj organizanto de prelegvojaĝoj.

Nia redaktoro sendas al ni tre kontentigan bultenon kies interreta formo prezentas belajn kolorojn kaj fotojn pri temoj tre diversaj kaj verkitaj de pluraj homoj de la regiono.

Ni starigis novan estraron kies ĉefa tasko estos komune pripensi la elspeszojn. Ĝi konsistas el delegitoj de la kvin departementoj. Nomo : **Christian Lévesque** (Manche), **Anne-Marie Leprévost** (Orne), **Jean-Christophe Groult** (Calvados), **Barthélémy Maurau** (Eure) kaj **Patrice Dufeu** (Seine-Maritime).

De du jaroj, ni konstatas, ke nia Ĝenerala Asembleoj bone sukcesas parte pro tio, ke ni invitas eksterlandan preleganton. Post esperantistoj de Pollando en 2012 kaj de Japanio en 2013, ni esperas elkovri kulturon de alia lando dum la Ĝenerala Asembleo de 2014 kiun vi esperable tre multaj partoprenos !


Bonajn sukcesojn al ĉiuj en via agado !

### Yves NICOLAS

Interna vidaĵo de la abatejo, kie ni vesper- kaj tag-manĝis en Bricquebec



Hori Jasuo dum unu el la du prelegoj, en la urbestrara salono de Bricquebec (50)




La urbaj lumaj paneloj alvokis ĉiujn al la du prelegoj de Hori Jasuo : Japana skribarto, kaj Fukuŝima katastrofo.



Yves NICOLAS, la urbestro de Bricquebec (meze) kaj pastro Mark dum la malfermo de nia Ĝenerala Kunveno la 22an de junio.





## La Kaverno de Baligano.

Paĝo 3a

(komentoj de pastro **MARK**, kaj poemo de **Côtis-Capel**)

La Kaverno de Baligano, en Flamanville, antaŭ la starigo (1978) de la atomenergia centralo estis fendego situanta piede de la kabo Flamanville, ĉe la nuna loko de la centralo, ĝi sinkis 200 metrojn longa ĝis la kerno de la klifo.

La fluso, impete enŝoviĝanta en la klifon, eligis terurajn bruegojn. Pri tio atestas loka legendo : unu drako kaŝita ene, teruris la loĝantaron, kiu devis oferi homajn viktimojn, precipe infanojn, por kvietigi la monstron. Tia situacio daŭris ĝis la alveno de irlanda monaĥo, Sankta Germano (448 p.j.c.), kiu venkis la Beston. La monstro estis ŝtoniĝita en bloko de granito rustita per la fera erco, kies koloro elvokis la sangon de la oferitaj senkulpuloj.

La deveno de la vorto Baligano restas mistera. Neniu sukcesis alporti kontentigan etimologion. Hodiaŭ la Kaverno de Baligano malaperis. La atomenergia centralo anstataŭis la bestokavernon. En la jaroj 1980, la fosado de la klifo kaj detruo de la kaverno estigis abundan literaturon. Certe la teksto, la plej interesa, estas dialekta (normanda) poemo verkita de Louis Lohier, Côtis-Capel (plumnomo) en lia kajero « Le Grand Câté », en kiu li atakas la inĝenierojn kiuj konstruis la nukleajn reaktorojn.

En lia poemo la drako fariĝas giganta polpo, kies tentakloj kapablas etendiĝi sur la tutan ĉirkaŭaĵon.

Unu tagon, gravuloj vizitis nin.

Fiereguloj, fanfaronuloj, arogantuloj :

Laŭdire, konsilanoj, deputitoj.

Multaj ili estis, tre multaj, sennombraj

Vestitaj laŭ la Pariza modo

Per ŝuoj ne taŭgaj ĉe ni, kamparanoj.

Nu, ni veturigis ilin per aŭtoj

Ĉar ili ne volis makuli siajn belajn ŝtrumpetojn.

Aliaj sekvis ilin : Scienculoj ili estis.

Ĉie oni renkontis ilin. Ili kuradis

Traceis, markis, farante al si oportune,

Same kiel temis pri liaj klifoj,

Same kiel hejmohavuloj ĉi-tie :

« Tie ! Ĉi tie ! Metu tion en la kavon ! »

Ni maltrankviliĝis pri iliaj elpenaĵoj

Kion ni estos vidontaj, miaj povraj infanoj !

Sed, tiuj eksteruloj ja nemiam vidis ion !

Ili surpaŝadis nian bluan sablokanon,

Niajn orbutonojn, niajn lekantetojn,

Niajn digitalojn kaj iliaj kloŝetoj.

Ili ne vidis tuj apud siaj piedoj,

la maron, kiu venis ĉepiede lekanta...

Ĉu ili lernis en lernejoj, kio estas la mara zumado ?

Ĉu ili scias, kio estas la furiozanta maro ?

Finfine, unu tagon ni ja sciis.

Ni sciis : ve ! Tio estis malfeliĉego !

Tiuj ĉi Sinjoroj per belŝtofoj vestante sin

Volis trudi siajn meĥanikojn

Ĉe roko, ĉe maro.

Unu meĥaniko por la malbono, mi ja scias.

Viaj altaj klifoj, oni ilin difektas.

« Eĉ se ili estas fortikaj, oni trapelas ilin ! »

Kaj jen subite, tio estas grandega sabotorgio !

Kie vi estas scienculoj, hodiaŭ kiam la maro

detruas kaj dehakas ĉion ?

Mi klarvida aŭdas kvazaŭan kolerblekadon.

Oni ne senkaŭze ekscitas kaj sian patron kaj sian patrinon.

Ĉu vi aŭdas la plorojn, kiuj eliĝas el Gerfao ?

Ĉu vi aŭdas la krietojn de la suloj kaj de la mevoj el Diepdao ?

Iru paŝege ! Malantaŭen iru ! Ili estas sin ĵetontaj al via kapo.

Ĉu vi aŭdas la henadojn de Biedao ? Hodiaŭ tio estas festotago por ĝi,

Sakrante, ĝi forenĵetas sian ŝaŭmon ĝis supre de la klifo

Kaj igas tremegi la plej kuraĝajn de la vilaĝo.

Ekrigardu al la Kvin Kornoj, la volviĝantan,

klakantan, vipantan maron,

Kiuj estas vi ĉiuj kaĉigontaj kiel muŝetoj, ridante pri viaj grimacoj...

Plia teruraĵo ! Foriru ! Malantaŭeniru ! Fuĝu !

Ĉu vi aŭdas La Beston de Baligano hurlanta al la morto ?

Ah ! Tiu ĉi ! Oni tiel ekscitis Ĝin !

Priatentu ! Mi certas, ke Ĝi vekigis

Kaj ĝiaj tentakloj sekvos vin kaj trovos vin ĝis viaj plej foraj padoj

Kaj kuntiros vin en ĝian abismon, el kiu neniu revenis.

Certe ne ! Oni ne ride ekscitas la mil jarojn de nia Besto.

Ah ! Se vi konus Ĝin kiel oni kredas koni Ĝin !

Foriru. Malantaŭeniru. Fuĝu. Tio estas la malfeliĉo

sur vi, hodiaŭ aŭ morgaŭ

Kaj por savi vin ĉi-foje, neniom helpas, eĉ Sankta Germano ne ĉeestos !

**Côtis- Capel**



### Forpaso de amikino LYDIE :

Forpasis samideanino **Lydie CARON**, la 1an de aprilo 2013. Ŝi estis delonge fidela klubanino en Le Havre.

Ŝi konatiĝis kun Esperanto en la kvardekaj jaroj kiam ŝi vizitadis profecian liceon antaŭ la okupacio fare de la tiama germana armeo. Lernolibro atestis pri tiu epoko en la familia biblioteko.

Kiam Esperanto estis instruita en la kolegio de sia pli aĝa filino, amikino Lydie denove interesiĝis pri la afero kaj la tuta familio aliĝis Havran Societon de Esperanto. Ankaŭ ŝi gastis eksterlandajn samideanojn kaj ŝi partoprenis internaciajn kongresojn. Bonvole ŝi engaĝiĝis en la lokaj kampanjoj kaj ŝi pretis iel ajne agis laŭ siaj nombraj komitetencoj.

Tiu subita forpaso afliktegis ŝian familion kaj ŝian amikaron.

Ni konservu tenere memoraĵojn pri ŝi, fonto de kuraĝigo, saĝo kaj espero.

### Sylvie CARON



**Lydie CARON** sidas apud sian filinon **Sylvie** dum la Ĝenerala Kunveno de E° Normandie en Grand Quevilly 2006/03/25.

Komence de julio, la dua filo, **Jean-Christophe**, de niaj geamikoj Pierre kaj Marie Thérèse **QUILLAUD** el Grand Quevilly, forlasis nin. Li estis 40 jaraĝa. Niajn plej amikajn pensojn al Petro, Marie-Thérèse, al lia frato Arnaud, al Hélène kaj al ĉiuj familianoj.

## Mirejo Grosjean vizitis Flers

La 9an de aprilo, je 12h00, Mirejo kun sia eskorto (el 8 esperantistoj de Hérouville) rendezuis kun tri anoj de la klubo de Flers, en sociala centro « Emile Halbout » kie okazas ĉiusemajna E-kurso (marde, 14h30 – 16h15). De tie, ĉiuj karavane veturis ĝis Saint-Georges-des-Groseillers por tagmanĝi ĉe Zef kaj Michèle, bonkoraj gastigantoj.

Dum la tagmanĝo, preparita de la « ĉielarka kvartala regio » (régie des quartiers), Mirejo priparolis edukan kaj lingvan diversecojn en Svislando.

Posttagmeze, la 14 homojn gvidis Zef per lumbildoj pri siaj mirindaj bicikladoj, kiun li priskribis en nun fame konata libro « Avo biciklas ĉirkaŭ la mondo » akirebla en la franca kaj en esperanto.

De la 15a de aprilo ĝis la 15a de oktobro 2000, li bicikladis de Yffigniac (Bretonio) ĝis Oulan-Oudé (apud la lago Bajkal) : 11 000 kilometroj.

De la 15a de majo ĝis la 15a de oktobro 2001, li bicikladis de Islamabad (Pakistano) ĝis Vladivostok : 10 000 kilometroj.

De la 15a de majo ĝis la 1a de septembro 2002, li laŭiris 9 000 kilometrojn tra Kanado, de la okcidenta Vancouver ĝis la orienta Halifax.

En 2004, li bicikladis por sporta defio de Brest ĝis Vladivostok, t. e. 14 000 kilometroj dum 66 tagoj. Tutmonda rekordo !

Zef kaj Mirejo (ankaŭ tre vojaĝema estas ŝi) opinias esperanton tre utila por viziti nian mirindan planedon.

### Anne-Marie Leprévost

## CHATEAU de GRESILLON

### St Martin d'Arcé

### 49150 Baugé en Anjou

Tel. : 02 41 89 10 34

[www.gresillon.org](http://www.gresillon.org)

### Programo 2014a :

**Fringoj :** 19-26 aprilo.

**Printempas :** 26 aprilo - 4 majo.

### Someraj Semajnoj :

28 junio - 11 julio. - 1-15 aŭgusto.

**Aŭtune :** 24 oktobro - 1 novembro.

**Jarfina Festego :** 28 decembro - 2 januaro.

Maison  
Culturelle de  
l'Esperanto





### Financa raporto je la 31a de decembro 2012

ENSPEZOJ (Eŭroj)		ELSPEZOJ (Eŭroj)	
Ĉe CCP, la 31a de decembro 2011 :	2 250,06 €		
<b>Kotizoj :</b> De la 01/01/2012 ĝis la 31/12/2012 :	576,00 €	<b>Bulteno :</b> Sendado : 370,31 leterkovertoj + poŝtmarkoj : 300,70 Inko+ Etiketoj+ Slipoj 69,61	
		<b>Poŝtbanka</b> Administracio	14,18
		<b>Subvencio</b> Hérouville Roman Dobrynski	56,98
		<b>Ĝenerala Kunveno</b> Hérouville	20,87
<b>Sumaj ENSPEZOJ :</b>	<b>576,00 €</b>	<b>Sumaj ELSPEZOJ :</b>	<b>462,34 €</b>
		Ĉe CCP, la 31a de decembro 2012	<b>2 363,72 €</b>
<b>Bilanco</b>	<b>2 826,06 €</b>	<b>Bilanco</b>	<b>2 826,06 €</b>

Tiu bilanco ne inkluzivas subvencion de 150 € por la Hérouville-grupo ( 17-18 novembro. Staĝo kun Svetlana Smetanina) La ĉeko farita komence de decembro 2012, estis enkasigita de tiu grupo fine de aprilo 2013a.



Dunivelaj kursoj ekis la 1an de oktobro je la 17h15 kaj 18h30, ĉiumarde, en la Asocia Domo de Hérouville Saint Clair (14). Informoj ĉe :

yvanmi@club-internet.fr

<http://herouvilleesperanto.blogspot.fr>

### Alvoko al ĉiuj Normandaj grupoj :

(Le Havre, Flers, Coutances, Cherbourg, Hérouville, Granville regiono ....)

Ne forgesu sendi al nia bultena adreso (vidu frontpaĝe la adreson de la prizorganto), ĉiujn praktikajn informojn (adreso, datoj, horoj, niveloj, kursgvidanto, nombro da departoprenantoj...). Ni nepre publikigos tiujn informojn en la venontaj bultenoj; same kiel fotojn de viaj grupoj. Bonvolu ankaŭ sendi al ni la adresojn (poŝtan kaj retan) por ke viaj novaj gelernantoj ricevu senpage dum la nuna lernjaro nian modestan bultenon. Antaŭdankon pro la informoj !

### SAT KONGRESO 2014 en DINAN

Armor-Esperanto, en Dinano, organizas esperantan aranĝon kaj jam bonvenigas vin en la venonta

#### SAT kongreso 2014

(Sennacieca Asocio Tutmonda):

- antaŭkongreso la 7-8an/08/2014 (dutagaj ekskursoj en belega turisma regiono).

- kongreso en Dinano la 9-16an/08/2014.

- postkongreso : internacia semajno en Pluezeko.

Jam eblas elŝuti aŭ rekte/rete plenigi aliĝilon alklakante la ĉi-suban ligon al la kongresretejo:

<http://www.satesperanto.org/-2014-87a-Dinano-.html> Jen ankaŭ retadreso de la kongreso : [satdinan2014@gmail.com](mailto:satdinan2014@gmail.com)

Ne hezitu restadi en belega regiono dum tri someraj semajnoj sen sekve kie multaj esperantistoj pretiĝos gastigi vin en esperanta etoso.

### MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO

8a de Marto ĝis la 15a de Marto 2014

Restadejo Val d'Esquière - Les Issambres - Francio

Ĉu ankoraŭ frostas en via regiono ? Tuj venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdal-arboj ! Vin atendas amika familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro...

Kursoj tri-nivelaj de la 9h00 ĝis 12h00 kaj 18h00 ĝis 19h00. Liberaj posttagmezoj por bankuracado en proksima marakva banejo, vizitado de Fréjus, Saint-Raphaël, Nico (karnavalo), Menton (festoj de la citronoj), Maures monteto (mimozo kaj piedekskursado), Saint-tropez, Sainte-Maxime, Bormes-les-Mimosas, Vintimille (Italio)...

Distraj vesperoj, prelegoj, kantoj, skeĉoj...

**Limdato: 2013/12/01**, poste... se plu restos lokoj ! **Informoj, aliĝoj** : Christine Grassaguel, les Iles d'Or, rue du Progrès. FR 83600 Fréjus kris grai@hotmail.fr Tel.: 04 94 95 66 18.



Poŝtmarko eldonita en Bosnio-Hercegovino 2008. 100 jaroj de Universala E° Asocio.

# ESPERANTO - NORMANDIE

*Une ouverture sur tous les peuples, toutes les cultures*

## **Kotizo por 2014 (same kiel por 2013)**

Faru vian ĉekon profite de:

**ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN**

**Abon-kotizo por 2014 : 8 Eŭroj,**

kaj sendu ĝin al la kasisto :

Pierre Lemarchand,

2 Résidence Les Terres Quemines.

76113 Hautot-sur-Seine.

## **MUSA ANEKDOTO**

Mi ne ŝatis Musaĉon, li estis la plej forta,  
Kaj kiam ni rilatis, ĉiam li estis prava.  
De l' plado li min forpuŝis kiam manĝadi tempis,  
Kaj fronte al musinoj, li min ĉiam ofendis.

lutage ni trovis belan fromaĝopecon  
Stultege eksponita de homo sur la planko  
Kie de kelkaj tagoj ni lasis nian fekon.  
Ni spertis plezuregon de tia naiveco.

Longtempe ni vagadis apud la fortunaĵo,  
Malfide atendente aperon de objeto.  
Sed ne ! Nenia homo, nenia kaŝita kato,  
Nepra sinlentego, nur sendefenda manĝo !

Mi ekantaŭeniras al la dia odoro,  
Sed unufoje pli, Musaĉo min forfrustras !  
Li per dentoj minacas, kaj iras al grujero  
Kiu lignan tabuleton malmulte superstaras.

Je kelkaj centimetroj, Musaĉo rehezitas ;  
Kion do li timas tiu aĉa stultulo ?  
Fine de unu kruro, li la nutraĵon tuŝas,  
Kaj elmontras ekstazon ĉe unua buŝpleno.

Sed klakego aŭdiĝas, surplanke io saltas !  
Infero, paniko, min bategigas la koron !  
Kurante mi forfuĝas, pensante "Musaĉo sekvas",  
Kaj fine enĵetiĝas en nian musan truon.

Dum horo mi atendis, Musaĉo ne revenis.  
Kiam miaj korbatoj fine renormaliĝis,  
Iri la strangan lokon mi trovis la kuraĝon.  
Tie kion mi vidis superas la imagon !

Du tre atentemaj kursaninoj de la  
grupa kurso de Hérouville Saint  
Clair (14) : Esperanto estas ja  
**universala** lingvo por ĉiuj !!!!!



Ne Musaĉon ventrosatan, triumfan kaj timigan  
Mi vidis, sur la planko, sed kvazaŭ ĉifonaĵon,  
Hororan, molan, sangan, kun kolo platigita  
De ferdrato kruelega rompinta vertebraron.

De naztruoj sango fluis, la okuloj eksterkapis,  
Kaj globege klarigon petis, dum la malantaŭaj kruroj,  
Translime streĉegitaj, vane kalcitri ŝajnis.  
Nenion ve mi povis. Min invadis mikstaj sentoj.

Al la komuna truo, ŝanĝita mi reiris.  
Mi fariĝis la estro, musinoj min admiris,  
Sed maleblis forgesi la fiokazintaĵon.  
Min obsedis la volo kompreni la misteron.

Plurfoje mi reiris al la timita loko.  
La korpo de Musaĉo malaperinta estis.  
Sed ĉiam la fromaĝo tentege sin proponis,  
ĉio estis kvieti, videble sen danĝere.

Mi ja devis reprovi ! Nun neniu min bremsas,  
Per la inteligento plejmulton mi superas,  
Mi vidos la insidon, detektos neglataĵon,  
Kaj al la musa truo alportos la fromaĝon.

Mi do redirektiĝas al la senpova loko,  
La sentoj je alarmo, ĉiudirekten gvas,  
La predo sin oferas, fi ! Mi decidite mordas ...

...

En l'aero varmeta dolĉa muziko regas,  
De si mem mia korpo en ĉielo leviĝas,  
Baletoj de musinoj min dance akompanas.  
Kaj palaco aperas, el lardo kaj grujero,  
Kie min bonvenigas, ridete ĉe portalo,  
Kun apertitaj brakoj, ofertita muzelo,  
Mia eksa malamiko, nune ... Sankta Musaĉo !

**Henri ROUSSEAU**